

Gottfried Keller,  
Pacon al la kreaĵo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Araneojn malŝatadis  
Mi dum junecaj jaroj,  
Ili malsupren sin lasadis,  
Kuris sur la kap-haroj,  
Sidis kaŝe en anguloj;  
Min timigis la aĉuloj,  
Sur la tablo kuregadis,  
La mortigo ne ĉesadis.

Kiam la harar' griziĝis,  
Mi ilin ne plu ĉasis,  
Tiam fine mi saĝiĝis,  
Ilin vivi lasis.  
Nun mi ilin rare vidas,  
Kaŝe ili ie sidas;  
Sed se iu sin vidigas,  
Mi min saĝe elvojigas.

Se mi havus infaneton,  
Mi gardus ĝin honore,  
Gvidus ame la hometon,  
Dirus al ĝi kore:  
,Lasu vivi araneojn,  
Ili same sentas veojn.'  
Frue iĝus ĝi paculo,  
Ne nur kiel maljunulo!

*Traduko de la Germana poemo "Friede der Kreatur" de GOTTFRIED KELLER (Gotfrido Kelero, \*1819-07-09 – †1890-07-16) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1982-10-10.*

*MR-003-2 / Arg-318-643 (2005-08-02 15:49:32)*